

# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

**Volumo 58, Numero 11, novembro 2023**

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**  
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## **Anonco: Zamenhofa Tago**

La Zamenhoffesto okazos dimanĉon la 17an de decembro je la 12ptm en Esperanto-Domo.

Ni planas:

- prelegi
- ludi
- kune tagmanĝi kaj havi bonan tempon. **Aliĝu al ni!**



## **Interesaj malkovroj dum mia biblioteka laboro**

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*

Mi nun laboris pri la biblioteko ĉe Esperanto-Domo dum iom pli ol jaro. Ĝis aprilo ĉi-jare mi katalogis ĉiun libron (proksimume 2750), registrante la titolon, verkisto(j)n, tradukinto(j)n, eldonejon, eldonjaron, nombron da paĝoj, bindaĵon, kategorio(j)n, kaj nombron da ekzempleroj en la kolekto. Poste, mi ellaboris kodsistemon speciale taŭgan por nia kolekto, dividatan en tri sekciojn, kiuj estas: Ĝenerala, Pri-Esperanta, kaj Literatura. Mi rimarkis kelkajn aferojn dum mi katalogis kaj kodigis la kolekton:

1. Estas multaj tre malnovaj libroj, iuj eldonitaj dum Zamenhof ankoraŭ vivis.
2. Estas multaj ekzempleroj de iuj tre popularaj titoloj, ekzemple: Aŭstralia 22a-kongresa kantar(et)o (32); Gaja Leganto per Esperanto (16); Aŭstralio: lando kaj popolo (13); Paŝoj al plena posedo (10). Multaj libroj venis el la privataj kolektoj de pasintaj esperantistoj, do tio ne estas tiel surpriza.
3. Estas 39 libroj pri spiritismo<sup>1</sup>, tamen mi supozas, ke ne multaj esperantistoj en Aŭstralio estis spiritistoj. Fakte, laŭ surskriboj en la unuaj paĝoj, plej multaj el tiuj libroj estis donacoj de alilandaj esperantistoj, aparte el Brazilo.

Mi estas ofte tentata halti kaj legi iun aparte interesan libron, sed mi bone scias, ke mi havas specifan taskon kaj devus ne permesi min esti distrata. Tamen, mi kunportis unu libron hejmen, Aŭstralia Antologio, ĉar mi eksciis, ke iu eble volas aĉeti ĝin de la libroservo. Mi multfoje antaŭe vidis la kovrilon de tiu libro, sed neniam atente rigardis ĝian enhavon. Ĉe hejme, mi esploris ĝin, kaj tre surpriziĝis trovi tradukojn de du poemoj de mia plej ŝatata aŭstralia poeto, Les Murray (kiun mi persone renkontis dufoje). Kaj la tradukinto estis la fama skota Esperantlingva poeto kaj aŭtoro, William Auld!

Unu poemon mi konas tre bone (en la angla): An Absolutely Ordinary Rainbow. Do, mi tre interesiĝis legi ĝin en Esperanto. Jen ĝi:

## Ĉielarko Komplete Ordinara

La famo ĉirkaŭiras ĉe Repin,  
la onidiro ĉirkaŭiras ĉe Lorezini,  
ĉe Tatersalo viroj ĉesas rigardi ciferfoliojn,  
la borsaj skribaĉistoj forgesas pri l' kret' en siaj manoj  
kaj viroj kun pano en poŝ' forlasas la Grekan Klubon;  
Ulo ploras en Placo Martin. Ne eblas ĉesigi lin.

La trafik' en Georgo-strato haltspiralas tra duonmejlo  
movaĵdrenite. La homamasoj agitiĝas pro parolado  
kaj pliaj homamasoj alrapidadas. Multaj trakuras flankvojojn  
kiuj antaŭ minutoj estis ĉefstratoj tumultaj, indikante:  
Ploradas ulo tie sube. Ne eblas ĉesigi lin.

La vir' ĉirkaŭita de ni, kiun alproksimiĝas neniu  
simple ploradas, kaj tion ne kaŝas, ploradas  
ne infanece, ne ventsimile, ja kiel viro  
kaj ne proklamas tion, nek brustobatas, eĉ ne  
tre laŭte plorsingultas — tamen la plordigneco

retenas nin de lia spaco, la kavo kiun li kreas  
en la lum' tagmeza, en sia pentagramo de tristo,  
kaj en l' amaso uniformuloj, kiuj provis ekkapti lin,  
lin fikse rigardas kaj mirante sentas ke l' mensoj  
larmono sopiras kiel ĉielarkon infanoj.

Iuj diros, en postaj jaroj, ke aŭreolo  
aŭ ia potenco ĉirkaŭis lin. Tiel ne estas.  
Iuj diros, ke ili ŝokiĝis kaj volis ĉesigi lin  
sed ili ne ĉeestintos. Plej agresa vireco,  
plej fortika sinrego, plej vigla spiritulo inter ni



tremas pro silento, brulas pro neatenditaj  
paco-prijuĝoj. Iuj en la promenejo kriĉas  
kiuj supozis sin feliĉaj. Nur plej malgrandaj infanoj  
kaj tiaj, kiaj elrigardas Paradizon, alirias lin,  
sidas ĉe liaj piedoj, kun hundoj kaj polvkovritaj kolomboj.

Ridinde, diras viro apud mi, kaj kovras  
permane la buŝon, kvazaŭ ĝi diras vomaĵon —  
kaj mi vidas virinon, brilantan, la manon etendi  
kaj tremi ricevante la donacon de plorado;  
ankaŭ tiom kiom sekvas ŝin tion ricevas

kaj multaj ploras nur pro l' akcepto kaj pliaj  
rifuzas plori, timante ĉian akcepton,  
sed la viro ploranta, kiel la tero, nenion bezonas,  
la vir' kiu ploras ignoras nin, kaj elkrias  
el sia tordita vizaĝo kaj ordinara korpo  
ne vortojn, sed triston, ne mesaĝojn, sed malĝojn  
duran kiel la tero, apikan, ĉeestan kiel la maro —  
kaj kiam li ĉesas, li simple ekmarŝas inter ni  
viŝante la vizaĝon laŭ digno de unu  
vir' kiu ploris, kaj nun la ploradon finis.

Evitante<sup>2</sup> kredantojn, li rapidas for laŭ Pit-strato.

Jen la angla originalo:



## An Absolutely Ordinary Rainbow

The word goes round Repins,  
the murmur goes round Lorenzinis,  
at Tattersalls, men look up from sheets of numbers,  
the Stock Exchange scribblers forget the chalk in their hands  
and men with bread in their pockets leave the Greek Club:  
There's a fellow crying in Martin Place. They can't stop him.

The traffic in George Street is banked up for half a mile  
and drained of motion. The crowds are edgy with talk  
and more crowds come hurrying. Many run in the back streets  
which minutes ago were busy main streets, pointing:  
There's a fellow weeping down there. No one can stop him.

The man we surround, the man no one approaches  
simply weeps, and does not cover it, weeps  
not like a child, not like the wind, like a man  
and does not declaim it, nor beat his breast, nor even  
sob very loudly — yet the dignity of his weeping

holds us back from his space, the hollow he makes about him  
in the midday light, in his pentagram of sorrow,  
and uniforms back in the crowd who tried to seize him  
stare out at him, and feel, with amazement, their minds  
longing for tears as children for a rainbow.

Some will say, in the years to come, a halo  
or force stood around him. There is no such thing.  
Some will say they were shocked and would have stopped him  
but they will not have been there. The fiercest manhood,  
the toughest reserve, the slickest wit amongst us


trembles with silence, and burns with unexpected  
judgements of peace. Some in the concourse scream  
who thought themselves happy. Only the smallest children  
and such as look out of Paradise come near him  
and sit at his feet, with dogs and dusty pigeons.

Ridiculous, says a man near me, and stops  
his mouth with his hands, as if it uttered vomit —  
and I see a woman, shining, stretch her hand  
and shake as she receives the gift of weeping;  
as many as follow her also receive it

and many weep for sheer acceptance, and more  
refuse to weep for fear of all acceptance,  
but the weeping man, like the earth, requires nothing,  
the man who weeps ignores us, and cries out  
of his writhen face and ordinary body

not words, but grief, not messages, but sorrow,  
hard as the earth, sheer, present as the sea —  
and when he stops, he simply walks between us  
mopping his face with the dignity of one  
man who has wept, and now has finished weeping.

Evading believers, he hurries off down Pitt Street.



Mirigis min, ke Auld iel konservis la preskaŭ konversacian kvaliton de la originala poemo (kaj la poezion de Murray).

## Piednotoj

1. Kiel komparo, estas 46 libroj pri kristanismo, tamen 30 estas la Biblio aŭ Nova Testamento.
2. En la libro la vorto estas mistajpita "Evidante".

## Puzloj

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*

Dimanĉon la 19an de novembro okazis la tutaŭstralia konkurso pri puzloj. Dum tiu konkurso la partoprenantoj devas kunmeti puzlon de 500 pecoj kiel eble plej rapide. Pro tiu evento Donnalouise Gragg, jutubisto el Novzelando decidis vojaĝi al Sidnejo. Ŝi havas jutubkanalon, kiu temas nur pri puzloj.

La 16an de novembro ŝi vizitis la Esperanto-domon en Sidnejo. Kune kun Donnalouise kaj amikino de mi, ni kunmetis belan puzlon de 1000 pecoj. Ni donacis al ŝi la specialan Esperanto-puzlon kiun ni mendis pasintjare por la Zamenhoffesto. Donnalouise promesis montri tiun puzlon en sia kanalo kaj komenti iom pri Esperanto. Mi antaŭĝojas spekti ŝian filmeton.



*Donnalouise kun la Esperanto-puzlo*



*la puzlo de 1000 pecoj kiun ni kunmetis dum la vizito de Donnalouise en Esperanto-domo*



*vi vidas kiel nun aspektas la korto de Esperanto-domo*



EFNSW: Esperanto Domo

Kontaktu Jonathan Cooper: 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno  
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj

Kontaktu Roger (02) 9976 6320 [manly@esperanto.org.au](mailto:manly@esperanto.org.au)

La Meza Marborda Grupo: 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287

Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 [newcastle@esperanto.org.au](mailto:newcastle@esperanto.org.au)

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.

Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:

Esperanto Domo,

143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;

Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00

*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*

[www.instagram.com/esperanto\\_nsw/](https://www.instagram.com/esperanto_nsw/)

[www.facebook.com/EsperantoNSW/](https://www.facebook.com/EsperantoNSW/)

[www.EsperantoHouse.org.au](http://www.EsperantoHouse.org.au)

retadreso: [nsw@esperanto.org.au](mailto:nsw@esperanto.org.au)

Prezidanto: Jonathan Cooper

Vic-prezidanto: Dmitry Luŝnikov

Sekretario: Nicole Else

Kasisto: Alan Turvey

Estraranoj: Adam Levy, Terry Manley

